GRVPo ESPERANTISTA

# "FIDO KAJ ESPERO"

VALLADoLID

**Año 2001** MAYO-JUNIO **Nº 197**

**Dirección Postal:** Apartado, 119; 47080 VALLADOLID

Adherido a la Federación Española de Esperanto


## Editorial

Siguiendo una tradicional costumbre, de nuevo, aunque esta vez con algo de retraso, nos ponemos en contacto con todos vosotros para informaros de cuanto de interés haya ocurrido u ocurra en el mundo esperantista, dando primacía, como es lógico a lo relacionado con nuestra Ciudad y nuestra Nación.

Las actividades desarrolladas por el Grupo han sido, única y exclusivamente, las reuniones de los jueves de 8,15 a 9,15 de la tarde en el Centro Cívico EL CAMPILLO y a las que han asistido con mayor o menor regularidad un pequeño, pero selecto grupo de socios que nunca llegó a superar la decena.

Naturalmente que sería deseable que las actividades a realizar en el Grupo fuesen más variadas, pero para ello haría falta contar con la colaboración y asistencia de un mayor número de socios, pero, por diversas circunstancias, por el momento, ello parece casi imposible.

Por otra parte, leyendo los boletines que recibimos de otros Grupos o Asociaciones de otros lugares de España constatamos, con pesar, que la situación no es más boyante en otros lugares, ya que la labor de divulgación que se hace en otros sitios, como en Madrid dentro de **Expolingua**, o en Gijón, en la **Feria de las Lenguas** no da, al menos carecemos noticias de lo contrario, de resultados realmente positivos.

Pero a pesar de ello, no debemos desfallecer y como muy bien dice un poema del mismo creador (iniciador según otros) del **Esperanto** *"Cien semillas perdidas, mil semillas perdidas, sembremos, sembremos sin descanso"*

# LA NOVKREITA KRIMA INTERNACIA KORTUMO

La lastaj okazintaĵoj pri la aresto de S-ro Milosevic, ekza Prezidento de Jugoslavio, la pasintan 3-an de julio, kaj lia konduko al Nederlando por esti juĝata de la Krima Internacia Kortumo, reliefigas la faktón ke la eksaj reprezentantoj de ŝtatoj ne plu restos imunaj, kiam ili atencos grave kontraŭ difinitaj homaj rajtoj.

La statuto de tiu Internacia Kortumo estis adoptata ene de Diplomatia Konferenco, **en Romo, la 17-an de julio 1998** kaj 120 ŝtatoj balotis favore al la statuto, kvankam nun tiuj ŝtatoj devas ratifi ĝin, iom post iom, ĝis minimume 60.

La ideo juĝi individuojn kiam ili atentos grave kontraŭ la Homaro ne estas nova. Fakte, krom la nesukcesa klopodo juĝi al la Imperiestro Vilhelmo la 2-a de Germanio en 1919, estas pli konataj la triste famaj tribunaloj de Nurembergo kaj Tokio post la dua mondmilito por juĝi la kulpulojn de la naziaj krimoj. Sed tiuj tribunaloj nur funkciis por tiuj konkretaj kazoj.

La tempo pasis, kaj la ideo krei internacian kriman kortumon daŭris ene de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

Sed paralele kaj konsekvence de la teruraj masakroj okaze de la militoj en la eksa Jugoslavio kaj en Ruando, estis la Sekureca Konsilio de la UN kiu kreis du konkretajn krimajn tribunalojn por juĝi la kulpulojn de tiuj masakroj en tiuj du landoj. Tiuj specifaj tribunaloj ankoraŭ funkcias.

Sed samtempe, oni bezonis pli ĝeneralan kortumon kaj oni kreis tiun en Nederlando, malgraŭ la neaj balotoj de Usono, Hinduujo aŭ Israelo.

La 5-a art. de la statuto antaŭvidas la kompetentecon de la Kortumo pri **genocidoj, krimoj kontraŭ la Homaro, krimoj dum militoj ktp.**

Kutime, la individuoj kaj ĉefe la ŝtatestroj kaj registarestroj ne estis respondecaj antaŭ internaciaj kortumoj, la unuaj ĉar la privataj personoj ne povas iri antaŭ internaciaj instancoj kaj la duaj ĉar dum ilia deĵoro en la ŝtata posteno ĝuas je imuneco. Pro tio la generalo Pinoĉet perdis la imunecon kiam li foriris de Ĉilio kaj iris al alia lando, ĉar dum li restis en lia lando, la naciaj aŭtoritatuloj ankoraŭ konsideris lin imuna.

Sed iom post iom la internacia socio estas evoluanta (aŭ almenaŭ oni volas pensi tiel) al pli humaniga situacio kie la plej teruraj krimoj kontraŭ popoloj, rasoj aŭ homaro ne restu sen puno, kaj povos superi kelkajn sferojn de la ŝtata suvereneco. Nun ni devas esperi kaj fidi je la ratifo de tiu Statuto per la plejmulto de la mondaj ŝtatoj.

M.R.Urueña



# Decálogo de la Esperanza

1.- Confiar en el cambio, porque, si no, cualquier acción sería un sinsentido.

2.- Optar por la alegría, porque, si no, estaríamos ante una vida sacrificada, llena de amarguras. Y la esperanza es todo lo contrario, es la acción solidaria llena de entusiasmo. Será esta actitud la que nos permita acercarnos a los demás, demostrarles que realmente tiene sentido lo que hacemos.

3.- Proyectar hacia el futuro, conscientes de que los grandes cambios no llegarán a la mañana siguiente y que no somos los únicos protagonistas de ellos.

4.- Tener paciencia, ya que la espera puede ser larga y estar llena de dificultades. La visualización de los resultados de una acción solidaria continuada no es ni mucho menos inmediata.

5.- Compartir con los demás tus ideas, tus proyectos y tus deseos, porque trabajamos por un mundo más solidario y seria realmente ilógico intentar hacerlo uno solo.

6.- Arriesgarse, ya que se sale de lo convencional, de lo que es seguido por la mayoría.

7.- Estar tranquilo, porque vivir en la esperanza nos permite sentirnos a gusto con nosotros mismos, conocedores de que lo que estamos haciendo tiene sentido, es algo que merece la pena.

8.- Actuar con urgencia, porque aunque sepamos que los grandes cambios necesitan tiempo, somos conscientes de que hablamos de personas, de situaciones conflictivas, de peligros ambientales... y todo ello no puede esperar.

9.- Asumir los valores de justicia, igualdad y paz, porque estamos convencidos de que todos somos seres humanos, poseedores de los mismos derechos y deberes.

10.- Comprometernos, ya que sin el compromiso ningún proyecto podría llevarse a cabo.

Con mi afecto.

Bernabé Tierno Y.

# TRA LA MONDO

## Nova hispana samideano en la Akademio

MIGUEL GUTIÉRREZ



Okaze de balotado, por plenigi la vakajn postenojn ĉe la ***Akademio de Esperanto***, estis elektita kiel nova membro, *Liven Dek*, kaŝnomo de nia santandera samideano **Miguel Gutierrez Adúriz**, aŭtoro de tre moderna hispanlingva lernolibro pri Esperanto, tradukisto kaj verkisto de pluraj verkoj, ĉefe pri sciencfikcio kaj nuna redaktoro de ***Boletín***. De nun du hispanoj, apartenantaj al la tiel nomata *iberia skolo* membras en la Akademio. La alia estas **Jorge Camacho**

## 52ª Kongreso de Bulgara Esperanto Asocio

La bulgara esperantistaro kunvenos en la bela urbo ***Velingrad*** por tien okazigi de la 7-an ĝis la 9-an de septembro sia 52ª Kongreso de Esperanto.

## Internacia Silvestro en Budapeŝto



Ĉiu esperantisto kun juna spirito povas partopreni en la Internacia Silvestro okazonta de la 28-an de decembro 2001 ĝis la 2-an de januaro 2002 en la bela kaj arthistoria urbo ***Budapeŝto***.

## Du mil cent sep libroj en dek jaroj

Laŭ informo aperinta en la revuo ***Esperanto*** *(aprilo 2001)* dum la lastaj dek jaroj aperis pli ol du mil libroj pri aŭ en Esperanto pri diversaj temoj kaj stiloj.

Inter la esperantlingvaj eldonejoj esltaras en la unuaj lokoj U.E.A. kun 72 titoloj, Fonto kun 55 kaj Flandra Esperanto Ligo kun 54.

En nia lando ankaŭ estis eldonitaj libroj en Esperanto, ĉefe tradukoj de majstroverkoj de la hispana literaturo.




# HUMORO

## ENTRE CASADOS

-Mira Ceferino. ¿Te acuerdas de aquellos preciosos versos que me escribiste cuando éramos novios?

-Sí que me acuerdo, esposa mía, aunque han pasado más de cincuenta años.

-Pues mira, aquí hay un tal *Gustavo Adolfo Becquer* que te los ha copiado.

## LÓGICA INFANTIL

-Te advierto, dice su padre a Samu, que me están costando mucho dinero tus estudios

- -Pues te están estafando, papá. Porque no estudio ni papa

## ENTRE NIÑOS

- -Mi papá ha traído una caracola de mar que dice *"Recuerdo de San Sebastián"*.

-Pues el mío ha traído unas cucharillas de plata que dicen *"Fonda de la Estación"*

## ĈIAM SAMA

Li.- Mi sonĝis pri vi lastnokte karulino

Ŝi.-Ho karulo, kia vestaĵon mi surhavis?

## ĈE FOTOGRAFO

Virino venas al fotografisto kaj demandas: Ĉu vi povas pligrandigi foton de mia filo?

La fotografisto respondas: Kompreneble, sinjorino.

Denove la virino demandas ĉu vi povas pligrandigi la bildon sen ĉapelo? ,ĉar mi preferus la bildon sen ĉapelo.

Kial ne? Respondas la fotografisto, sed diru al mi kiuflanke via filo disigas la harojn?

Ne diru stultaĵojn, respondas la virino, tion vi jam vidos, kiam vi forprenos la ĉapelon

# somera ripozo

Post la normala aktivado laŭlonge de la jaro, venas por ni ĉiuj la momento de la ripozo kiujn ni profitos, laŭ niaj deziroj kaj emoj, ĉu vojaĝante al aliaj urboj kaj landoj por koni novajn kulturojn kaj tradiciojn, ĉu ĝuante belan kaj mildan klimaton ĉe la strando.

Kompreneble, por vera kaj entuziasma esperantisto, la somero, krom tio, devas esti okazo por partopreni en unu el la diversaj kongresoj, renkontiĝoj kaj seminarioj kiuj okazas en la plej diversaj partoj de la mondo kaj pri la plej interesaj ni jam informis vin en la oportuna momento.

**PERIÓDICO**

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
**47080 VALLADOLID**